



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

n°159

.unuigo de la normandaj esperantistoj
TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL,
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

AŬTUNO 1987A - (N° 74A NOVA SERIO)

HOULGATE

LA RAPORTOJ

Antaŭparolas
nia
Prezidanto!



Karaj Gesamideanoj,

ESPERANTO ĉi-jare fariĝis centjara. Estas por mi granda honoro prezidi nian kongreson ĝuste dum tiu jubilea jaro.

Kiom da progreso okazis inter la momento, kiam Dro ZAMENHOF publikigis la Fundamenton de nia lingvo kaj la nuna tempo, kiam tiu lingvo disvastiĝis tra la tuta mondo, nesufiĉe, sed tamen grandskale !

Ni ofte plendas, ĉar Esperanto ankoraŭ ne atingis la meritatan sukceson. Ni tamen pensu pri la kuraĝo de la unuaj Esperantistoj kiuj lernis la lingvon eĉ ne sciante ĉu aliaj personoj ankaŭ lernos ĝin, kaj ĉu la lingvo vere taŭgos kiel internacia interkomprenilo. Nun, ni ne plu povas dubi pri tiuj punktoj : centmiloj da homoj el ĉiuj partoj de la mondo lernis ĝin kaj ĝin uzas por siaj rilatoj kun alilandanoj. Ĝi akiris ampleksan literaturon kaj gazetaron. Diversaj radioj uzas ĝin ; kaj eĉ kelkaj firmaoj reklamas per ĝi. Certe tio ne sufiĉas, kaj ni devos ankoraŭ longe labori por ke ĝi fariĝu la dua lingvo de ĉiuj homoj, sed tio certe valoras la penon.

Imagu do mondon, kie ĉiuj povus interkompreniĝi, kie ĉiuj avertiloj sur la vojoj, en la urboj, stacidomoj, telefonbudoj, kaj publikaj lokoj estus en la loka lingvo kaj en Esperanto. Kiom pli simple estus por la vojaĝantoj, por la komerco, kaj por ĉiuj formoj de homaj interrilatoj ! Kiom da mono oni ankaŭ ŝparus evitante multlingvajn tradukojn ! Ni jam delonge komprenis tion, sed multaj homoj ankoraŭ ne komprenis ĝin. Do, estas nia devo komprenigi tion al ili, kaj propagandi kaj instrui nian lingvon. Ni ne malkuraĝigu. Certe, en niaj okcidentaj landoj, la progreso de Esperanto iom stagnas, sed en aliaj partoj de la mondo ĝi prosperas.

.../...

Ĉiukaze, kiam oni havas la bonŝancon posedi tiel valoran ilon kiel estas Esperanto, oni nepre devas profitigi el ĝi la tutan mondon. Ni do stre ĉu niajn fortojn por ke , kiel eble plej baldaŭ, laŭ la parolo de "LA ESPERO", tiu bela sono de l'Homaro por eterna ben' efektiviĝu.

En Houlgate,
la 4an de Oktobro 1987

2020-2021

la membroj de Normanda Esperanto Unuigo, kunsidante en Houlgate la 4an de Oktobro 1987 por sia jara Generala Kunveno, konstatas ke la lingvo-problemo akre prezentiĝas en Eŭropo, kaj ke urĝas batali por ke Esperanto oficiale ludu sian rolon de helplingvo antaŭ ol alia solvo estos adoptita.

1) Ke ĉiuj francaj Esperantistaj organizoj naciskalaj kreu komunan agadkomitaton por agi tiucele.

2) Ke tiu komitato ekkontaktigu kun la similaj eksterlandaj asocioj cele al komuna agado.

3) Ke internacia petskribo postulanta la uzon de Esperanto kiel oficialan komunan lingvon de Eŭropo estu organizata.

[illegible]

KOTIZO - ABONO : Por la jaro 1988 : 45 F.
C. C. P. n° 283 40 H ROUEN

ELDONAS : UNION des ESPERANTISTES DE NORMANDIE

"la verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"

FINANCA RAPORTO

Enspezoj

KOTIZOJ..... 2 570,00

REPAGO VVF..... 4 000,00
(PORT-BAIL)

PROFITO 86..... 843,00
(Generala Kunveno)

DIVERSAĴOJ..... 150,00

7 563,00

Ĉe la Poŝta Konto
la 16an/9/86..... 491,63

8 054,63

Elspezoj

BULTENO..... 3 715,55

SEKRETARIO..... 369,39

ANTAŬ-PAGO..... 1 638,00
(LVT HOULGATE)

SUBVENCIOJ..... 1 400,00
PROPAGENDO

DIVERSAĴOJ..... 500,00

7 622,94

Ĉe la Poŝta Konto
la 4an/10/87..... 431,69

8 054,63

KOMENTOJ PRI FINANCA RAPORTO

Leginte la raporton, vi konstatas ke nia ĉefa elspezo estas la bulteno. Ni ne plu povos sendi ĝin al tiuj kiuj ne pagis sian abonkoton. MULTAJ NE ANKORAŬ KOTIZIS POR 1987 !

Ni alvokas la nepagintojn ne atendi plu. Se vi ne pagis, vi trovos ĉi-kune alvokilon.

Ni memorigas al vi ke la 1987-kotizo estas 40 Frankoj.

Laŭ decido de la Generala Kunveno, la 1988 abonkotizo estos 45 Frankoj.

Tutcerte, al
UNION DES ESPERANTISTES
DE NORMANDIE
ccp no 283 40 H
ROUEN
kaj sendas al
P. QUILLAUD
16, rue du Lieutenant Paris
76120 GRAND QUEVILLY



Ĉu ili pagos ?

Petro KIJŬ



* SLAKE & MORTIMER, LA MISTERO DE LA GRANDA PIRAMIDO
Tekstoj kaj desegnoj de Edgar P. JACOBS. Traduko de Raporto DANNY kun
kunhelpo de Georges LACRANGE. Broŝuro, 62 paĝoj. Kosto 60 FRF (65 FRF
post la unua de decembro). ISBN 2-87097-
Temas pri novaj herooj en Esperantujo, kiuj baraktas kontraŭ la kolono-
lo Orlik en la granda piramido de Keopso. Ĝi estas tiel historie detale, ke
ĝi inspiris la nuntempajn arkeologiajn praserĉadojn. La tekstoj estas tiel
densaj kaj beletraj, ke estas kvazaŭ literatura verko ilustrita.

LA ĜENERALA KUNVENO EN HOULGATE

La Prezidanto, S-ro Pottier, malfermis la Kunvenon substrekante la Centjarigon de Esperanto (legu la bultenan frontpaĝon).

Sekretaria raporto (S. Caron)

La Komitato kunvenis kvarfoje dum la pasinta jaro. Ĉefe estis pritraktita la organizado de la venonta Ĝ. K.. Post enketoj pri eblaj kongresejoj, ni decidis organizi en Houlgate dank'al helpo kaj la sindonemo de S-ro Angenault.

Pri la bulteno : unue la Grupo de Rouen zorgis pri tajpado, printado kaj sendado. Nune S-ro Nicolas redaktas, kaj la Ruena Grupo peras por printado kaj sendado.

Subvencio estis donita al vigla samideano de nia unuigo.

La Ĝenerala Kunveno

U. N. E. Ĉefe estas kunligilo de lokaj grupoj kiuj raportas pri sia agado kaj vivo en la bulteno sed ankaŭ okaze de la Ĝenerala Kunveno. Pro la multaj punktoj de la tagordo, kaj la kromaj diskutitaj en Houlgate, nur Rouen havis sufiĉe da tempo por prezenti sian agadon, cetero imitindan. T. e. : budo en Ekspozicio "Infolangues", en "Fête de l'Avenir", staĝoj en Junuldomo, prelego de S-ro Blanke el G. D. R. en la Universitato, la "Normanda Esperanto" Rendevo la diversaj anoncoj en tiu bulteno sufiĉas por reliefigi la gravecon de tiuj venontaj eventoj.

Kompreneble dum tiu Ĝ. K., pri la bulteno ni multe diskutis ĉar ĝi estas la plej grava ero de nia regiona reto... sed ankaŭ la plej kosta. La financa raporto de nia kasisto S-ro Quillaud pri tio ĉion bone klarigas. La novaĵ tarifoj por sendi la bultenon grandparte altigas la elspezojn. La ĉeestantaro favoris la novan abonkotizon 45,00 frankan.

En aparta artikolo la leganto informigos pri la alvoko de nia Asocio por ke la Esperantistaj Naciaj Asocioj klopodu por agado komuna.

P. Dubourg el Rouen faris prezenton de la "Normanda Esperanto Rendevo", kaj du proponojn por venontaj agadoj de nia Asocio. Temis pri : unue Libroservo kaj interŝanĝo kun orientaj landoj, due pri aligo al "Monda Federacio de Kulturaj Asocioj". El tiuj du proponoj neniu estis aprobita. Prezento en la bulteno povus ebligi pli serenajn pripenson...

La Ĝenerala Kunveno 87 en Houlgate finiĝis, vivu tiu de la venonta jaro : 1988 !

Verŝajne ĝi okazos dum la unua semajnfino de Oktobro, ĉar tiu dato aspektas favora al ĉiuj, la lokon la estraro pridecidos, ĉiuj proponoj estas bonvenaj.

YVETOT

Nia samideano S-ro Duhamel, kiu jam pasintjare partoprenis la Kongreson en Pekino, ĉi-jare ĉeestis la Universalan Kongreson en la urbo Varsovio.

La 8an de Septembro, ni havis viziton de Berlina samideano, S-ro Roland Schnell, kiu bonvolis fari publikan prelegon pri sia urbo kun diapozitivaj. Tiu tre interesa prelego okazis en Esperanto kun traduko por la ordinara publiko. Je la fino, multaj el la ĉeestantoj faris demandojn, al kiuj la preleganto afable kaj interese respondis.

La 21an de Septembro komenciĝis en la Junuldomo nova Esperantokurso por komencantoj. 3 personoj ĉeestis la unuan lecionon, kaj kvara persono aliĝis al la kurso poste. El tiuj 4 lernantoj, 3 konvinkiĝis pri la valoro de Esperanto dum la prelego pri Berlino.

LE HAVRE

Okaze de la kampanjo pri la jubileo de Esperanto, publika manifestacio okazis la kvinan de septembro, ĉe la strato Zamenhof.

Spite al la misvetero, kvar-
deko da personoj, ĉefe esperant-
istoj, kaj du viĉ-urbestroj, tiun
kunvenon honoris.

Reprezentanto de la urbestro salutis, memorigante ke, antaŭ preskaŭ 30 jaroj, estis inaŭgurata tiu strato Zamenhof kiam, dum majo 1958, la Normandaj Esperantistoj kunvenis en Le Havre. Li diris sian konstaton ke la nobla revo de la kreinto, longe kiel utopio konsiderata, fariĝis realaĵo ! Li konkludis : " Esperanto kontribuu al la interkompreno kaj paco inter popoloj". Nia Prezidentino, dankante, skizis la vivon de Zamenhof : lia longa laboro por realigi sian ideon "interkomprenigo estas nepre ŝtupo al la paco". la publikigo en julio 1987 de la unua broŝuro anonima entenis tiun mirindaĵon kiu la nomon "Esperanto" alprenis. Sekvis saluto de esperantisto de Berlino, tradukita por la publiko.

Poste kunvenis la anaro por prelego de tiu germana samideano, kiu prezentis Okcidentan Berlinon. Honorvino permesis la retrovon de malnovaj esperantistoj el Le Havre ... kaj kolekti nomojn de lernontoj.

Gazetartikolo estis la rezulto (plia rezulto) de tiu manifestacio kiu aldonigas al pluraj aperintaĵoj depost la komencigo de la jaro, interalie pri la Centjariĝo de Esperanto, kaj pri la Kongreso en Varsovio, el kie havraj partoprenantoj sendis informojn rekte al la gazetoj.

Ni menciujn intervjuojn de nia Prezidentino kaj unu komitatano ĉe loka radio "Albatros", kiu ĝin

KARAJ LEGANTOJ

5

La bulteno estas al ni ĉiuj
tio signifas tutcerte ke ni
ĉiuj ĝin avide legas, sed ankaŭ ke
ni ĉiuj povas skribi artikolojn
por ĝi. Des pli ke la anedoktoj
kiujn vi travivis en Esperantujo
ne mankas.

NI VIN LEGU EN LA VENONTA BULTENO
KIU APEROS EN JANUARO 1988

dis-sendis dum pluraj tagoj, tage
plurfoje, antaŭ la manifestacio
"Strato Zamenhof".

La Monataj Kunvenoj de la Grupo disvolvigis kun meze 15 personoj laŭ la formulo de antaŭ-anoncitaj paroladetoj.

La membraro estas stabila, kaj ni esperas ke la lernintoj de la kurso "por emerituloj" aliĝos...

Havra Grupo.

[illegible]

TEURGOU

Kia vorto ! Kio estas tio !?

Se vi partoprenis en la U N E Kongreso en Houlgate, vi scias ke estas, tute simple, regalo por la palato kiun ni havis la plezuron gustumi, ĉe la Villa Simone. Tie, la kuiristo, S-ro Savary, bonvolis konfidi al ni la recepton de tiu deserto.

Vi preparu en bakovazo, kiu
 prefere estu el tero, la sekvajn
 ingrediencojn, miksu bone sen
 varmigo. Poste, metu en via bakujo
 por kuirado dum 4/6 horoj je tem-
 peraturo 90/100 °:


- 2 litrojn da lakto
- 140 gramojn da rizo (ronda)
- 200 gramojn da sukero
- pinĉo-preno da salo
- 1 supkulero da cinamo.

(Le Havre)

FERVOJMUZEO en NORVEGIO

Vojaĝonte eksterlanden ni kutime trafolumas la jarlibrojn serĉante adresojn de akceptemaj samideanoj, por plene ŝui la valor-
aĵojn de nia turismado. En Norvegio la delegitoj unuavide ne mult-
nombras. Tamen konsiderante la nur kvar milionojn da loĝantoj de tiu
lando, proporcie ili pli duoblas ol en Francio. Bedaŭrinde malfavoras
la kontaktojn la longaj distancoj inter la urboj kaj la ĉiam tro mal-
longa daŭro de la ferioj, rilate la multajn vidindaĵojn. Malgraŭ tio
en HAMAR kaj BERGEN ni iom renkontis Esperanton.

Ciujare en la U. E. A.-Jarlibro krom tutaĝa reklamo pri la
norvegaj ŝtataj fervojoj aperas alia reklamo: "Vizitu la norvegan
fervojmuzeon en HAMAR". Esperantlingva broŝuro estas proponata. HAMAR
kiu situas nur 130 kmoj for de OSLO la ĉefurbo, ĉe la lago Mjosa en
la alloga regiono Hedmark, certe valoras viziton. Do ni
tie faris etapon kaj konat-
igis kun nia samideano Per
Johan Krogstie, kuratoro kaj
ĉefa deĵoranto en la Muzeo.




Tuj post la enir-
pordo okulfrape impresas la
vizitantojn la ĉia estado de
Esperanto, oficiale uzata sam-
range kiel la norvega, angla
kaj germana. Afiŝoj, aviz-
tabuloj, prospektoj por ni
estas ja kompreneblaj. En la
akceptejo grandaj paneloj
trafe propagandas por nia
Internacia lingvo. Post la vizito neniu povas nei ties taŭgecon. Eble
tie kuŝas la plej pozitiva aspekto ŝuldata al meritplena laboro de
P. J. Krogstie kiu sukcesis enŝovi en oficialan ŝtatan vizitindaĵon
nian mirindan I. L-on (aŭ "ilon" !).

Tiu fervojmuzeo estas la plej malnova en Skandinavio. Ĝi
establiĝis en 1896. Sur vasta areo vidiĝas kolektitaj longavicoj da
vagonoj, lokomotivoj (normaspuraj kaj etŝpuraj), malnovaj kamparaj
stacidomoj, kioskoj, loĝdomoj, multaj fakaj objektoj, k. t. p..
Priskribi tian riĉan enhavon bezonus multajn paĝojn. Kiel sciante ne
necesa esti fervojisto por interesigi al fervojaj aferoj. Infanoj
kaj plenkreskuloj multe ŝuas la viziton, travivante la evoluon de la
ekspoziciita materialo, kaj spertante la trajnvojaĝon en la parko per
aŭtentika historia liliptvagonaro. (Lia malgranda ne ŝanĝita staci-
domo Killingmo datumas je 1896.


Dankon al nia samideano P.J. Krogstie kaj al la lokaj grup-
anoj kiuj helpis lin. Ili fervore (kaj fervoje !) sindoneme vivigas
nian karan lingvon.

F. Tailpied




POŝTMARKOJ

Priskribi nian regionon al eksterlandaj amikoj povas esti unu el la ĉefaj temoj de nia internacia korespondado, ĉu ne? La poŝto-administracio ĉi-jare multe kontribuis por bildigi tiun turisman aŭ kulturen sciigon ĉar franca P. T. T. eldonis tri poŝtmarkojn pri Normandio.



Tutmonde konataj estas la klifoj de Etretat. La beleco de tiu vidinda pejzaĝo des pli famigos dank'al la verko de la alt-valora pentristo Eugène DELACROIX (1798-1863) kiu ilustras la poŝtmarkon 2,20 F. valoran. Sed tiu pentraĵo ne klarigos al ni ĉu la pinto tie-ĉi estas kava kiel supozis Maurice LEBLANC en fama aventuro de Arsène Lupin...

Alia epoko, alia temo, alia artisto. "Virino kun sunombrelo" estis pentrita apud Trouville kiu tiuepoke ekiĝis rendezvuo de la parizaj riĉuloj. Parto de la verkaro de Marcel PROUST priskribas la tiaman vivon de tiuj "dikaj monujoj", precize sur tiu-ĉi marbordo. Honfleur posedas interesan muzeon pri Eugène BOUDIN (1824-1898) kies stilo anoncis la "impressionisme" skolon.



La tria poŝtmarko memorigas la 9an Centjarigon de la morto de Guillaume le Conquérant. Multaj urboj en nia regiono -Bayeux, Falaise, Rouen, Caen, k. t. p.- festis tiun datrevenon. La poŝtmarko prezentas bildon de la fame konata brodtapiŝo de Bayeux kiu rakontas kiel Guillaume iĝis la reĝo de la Angloj post la batalo de Hastings en 1066. Li elektis lingvon internacian : tiun de la glavoj.

Libroj

L I S T O NOVEMBRO '87

Mendojn kaj proponojn sendu al:

Pascal DUBOURG-GLATIGNY

3 rue G. Chédanne

76150 MAROMME La Maine Tel.35.75.87.66

Aldonendaj sendokostoj:

+10% ĝis 250Fr, +5% ekde 251Fr.

Tiuj libroj devenas de intersanĝoj kun esperantismaj kluboj el oriento (Pollando, Hungario kaj Sovetunio). Ili celas provizi tiujn homojn pere de tie neakireblaj verkoj.

Alproksimiĝas la Zamenhof-tago, plej oportuna okazo por libro-donaco...

3 Verkoj de NEMERE LA MONTO (1141J '85)
LA BLINDA BIRDO (1141J '83)
FEBRO

NUR: **115.F**

plus aktoj de la Varsovia Simpozio STRATEGIAJ DEMANDOJ DE LA
ESPERANTO-KOMUNUMO

(la prezo enkalkulas la sendokostojn, ne maltrafu la okazon!)

TUTE NE GRAVAS de AMPLIFIKI (kasedo)	72,00
LA INFERO de DANTE (trad. Kalocsay)	110,00
KVIN NOVELOJ de TUGLAS (Estona literaturo)	33,00
VENTOLUME de VAARANDI (poemoj)	33,00
LA LAKTISTO de MAEKULA de VILDE (romano)	39,00
HOMO de MIEZELAITIS (poemoj)	35,00
DONA BARBARA de GALLEGOS (Venezuela romano trad. DeDiego)...	48,00
PRI PERSONECO de ESPERANTISTO de TYELEWSI	19,00
STRATEGIOJ DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO (Varsovia Simpozio)....	30,00
ZAMENHOF, MOVADO, DOKTRINO (enkonduka verko)	26,00
LUDOVIKO ZAMENHOF (kasedo)	54,00
LA MONTO de NEMERE (La libro de la jaro '85).....	43,00
LA BLINDA BIRDO de NEMERE (La libro de la jaro '83)	43,00
FEBRO de NEMERE	43,00

Ankaŭ ne forgesu aboni la periodaĵojn kiuj prezentiĝis al vi amplekse dum la pasinta normanda renkontiĝo. LITERATURA FOIRO (145Fr/jare) kaj LA GAZETO (125Fr/jare) krome ĉiam enhavas ĉerpendan kursmaterialon kiu plej taŭge motivigas la progresantojn de niaj lerno-rondoj.

Cochez les mentions utiles.
A remplir en caractères majuscules.

MONSIEUR ☐ MADAME, MADemoisELLE ☐

NOM : _____

PRÉNOM : _____

ADRESSE : _____

CODE POSTAL : _____

LOCALITÉ : _____

AGE : PROFESSION :

.....

TÉLÉPHONE :

LANGUES ÉTRANGÈRES ET RÉGIONALES

CONNUES :

.....

S'INSCRIT AU STAGE DE NIVEAU 1 ☐

DE NIVEAU 2 : ☐ DE NIVEAU 3 ☐

POUR LES STAGES SUIVANTS :

- 12 ET 13 DECEMBRE ☐ 1987.

- 9 ET 10 JANVIER ☐ 1988

- 6 ET 7 FEVRIER ☐

- 5 ET 6 MARS. ☐

Je désire une documentation sur

les possibilités d'hébergement à

ROUEN : ☐ à l'Auberge ☐

à l'hôtel ☐ de Jeunesse ☐

MONTANT DE MON INSCRIPTION ☐

DATE : SIGNATURE : _____

prix : (Comprenant la cotisation
annuelle à l'association).

PAR STAGE :	100,00 F.	70,00 F. (*)
POUR LES 4 STAGES :	320,00 F.	220,00 F. (*)

(*) : pour jeunes de moins de 18 ans
étudiants, demandeurs d'emploi.

Prière de joindre votre chèque au
bulletin d'inscription ci-contre,
rédigez le à l'ordre du :
"GROUPE ESPERANTO REGION ROUENNAISE"
C.C.P. N° 2770.32.A. ROUEN.

Renvoyez le tout, au

GROUPE ESPERANTO REGION ROUENNAISE
43 RUE DESSEAUX - 76100 R O U E N.
TEL : 35.72.71.17.

A REGLER SUR PLACE : PRÉVOIR :

* - Pour le "NIVEAU 1" :

- Manuel du cours : 36,00 F.
"Metodo 11"

- Cassette des textes et
exercices. (Facultative)
: 47,00 F.

* - Pour les "NIVEAUX 2 et 3" :

- Manuels, environ 40,00 F.

autres inscriptions :

Si vous désirez inscrire d'autres
personnes à ces stages, veuillez
recopier ou photocopier le bulle-
tin d'inscription ci contre, pour
chaque participant supplémentaire.

STAGES ESPERANTO


12 ~ 13 décembre 87

9 ~ 10 janvier 88

6 ~ 7 février

5 ~ 6 mars

la langue inter-peuples



RENSEIGNEMENTS tel. : 35.72.71.17

rouen - 76100
- maison des jeunes.

objectifs :

COURS DE NIVEAU 1 : Débutants.

Ce cycle de 4 stages a pour objet de vous familiariser avec l'Espéranto, en étudiant l'essentiel de la grammaire, les 500 racines les plus fréquentes, vous permettant, grâce à la combinaison d'éléments invariables de posséder plus de 2000 mots et expressions, et d'acquérir une maîtrise suffisante de la langue pour vous exprimer simplement.

Entre chaque stage, possibilité de correction par correspondance des exercices des leçons étudiées lors des stages intensifs.

COURS DE NIVEAUX 2 ET 3 :

Perfectionnement et conversation.
Ces deux cours vous permettront de compléter l'étude de la langue. Ils vous entraîneront à l'emploi du vocabulaire et des nouvelles structures grammaticales, ainsi qu'à un réemploi systématique des structures étudiées au niveau 1. Un test de niveau sera effectué en début de stage.

Il sera toujours possible de changer de cours pendant le stage si vous le désirez.

dates :

	<i>Exemple pour cours Niveau 1</i>
- 12 - 13 Décembre 1987.	Prononciation : Leçons 1,2,3.
- 9 - 10 Janvier	: Leçons 4,5,6.
- 6 - 7 Février	: Leçons 7,8,9.
- 5 - 6 Mars 1988.	: Leçons 10,11, révisions.

programme :

LE SAMEDI :

- 14h00 - 14h30 : Accueil des participants.
- 14h30 - 15h00 : Informations sur le stage.
- 15h00 - Début des cours. 3 cours de 1 heure, entrecoupés de pauses de 15 minutes.
- 18h30 - Fin des cours.

LE DIMANCHE :

- 9h00 - 9h30 : Accueil.
- 9h30 - Reprise des cours sur le même rythme : 2 cours de 1 heure et pause de 15 minutes.
- 11h45 - Fin des cours.
- Possibilité de repas pris en commun à la Maison des Jeunes : Veuillez apporter votre couvert et votre repas. Restaurant (Pizzeria) à proximité immédiate du lieu de stage.
- 14h00 - Reprise des cours sur le même rythme : 2 cours et pauses.
- 16h15 - Fin des cours.
(Au total : 7 heures de cours.).
- 16h15 - 17h00 : Bilan du stage, "Pot de l'amitié".

Pendant l'accueil, les pauses, un service de librairie et un stand d'information seront ouverts. Des boissons seront à votre disposition.

organisateur :

GROUPE ESPERANTO DE LA REGION ROUENNAISE. 43 RUE DESSEAUX
76100 ROUEN. TEL. 35.72.71.17
Association Culturelle, Loi 1901, à but non lucratif.

moyens pédagogiques

- Cours par petits groupes.
- Manuels d'étude et d'exercices, lexiques ...
- Important soutien audio-visuel par transparents pour rétroprojection, tableaux, cassettes de prononciation et de lectures chansons ...

informations :

Dès votre inscription

vous recevrez, par retour du courrier, les documents de stage avec un plan de Rouen pour atteindre la Maison des Jeunes, ainsi qu'un programme détaillé.

situation :

La Maison des Jeunes est située sur la rive gauche de ROUEN, dans le centre ville, en face du centre commercial SAINT SEVER (Restaurants - parking), au milieu d'un jardin public. A proximité immédiate de la Maison des Jeunes, vous trouverez :

- 1 Hôtel **.
- 6 Hôtels *.
- 1 Auberge de Jeunesse.

Signalez nous si vous désirez recevoir une documentation détaillée sur ces possibilités d'hébergement. (Réservation à la charge des stagiaires.).

lieu du stage :

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE, 114 AVENUE DE BRETAGNE,
76100 - R O U E N . RIVE GAUCHE.